The eighth national congress of the E. A. N. A. will be held in San Francisco from August 22nd to 29th, in conjunction with the XI UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO. American Esperantists will thus have the opportunity of attending two important Congresses without extra cost. Although the sessions of the E. A. N. A. and those of the Universala Kongreso will be entirely separate, there will be but a single congress fee, \$5.00, entitling one to attend all sessions, festivities and amusements of both Congresses.

A definite program is being prepared and will appear in an early number of **Amerika Esperantisto**, the official organ. Although still too early for a complete announcement of Congress events, we may say that a most enjoyable excursion about the Bay is being planned, and that there will be no lack of entertainment for the Esperantists in San Francisco during the Congress week.

All kongresanoj will be admitted to the Exposition free on Saturday, August 28th, which will be "Esperanto Day" on the Exposition grounds, and the occasion for a great Esperanto demonstration.

The Congress badge, which will be given gratis to every kongresano, is the most beautiful ever designed for any Esperanto Congress and one which every Esperantist will be proud to own. If you cannot come to San Francisco send in the "Helpcongress dues" of \$2.50, which will entitle you to the badge and all the publications and documents of the Congress.

In sending membership fees or ordering publications of the Congress please use the "Dua Cirkulero" of the **XI Universala Kongreso**.

La adreso de la Kongreso estas simple

ESPERANTO KONGRESO, San Francisco.

New England Esperanto Association

The June meeting of the New England Division of the Esperanto Association of North America will be held in Boston, June 12th and 13th. The headquarters will be at the rooms of the Boston Esperanto Society, Pierce Building, Copley Square. All New England Esperantists are urged to be present, and visiting Esperantists from other sections are heartily welcome. We expect to have with us on a special visit, the President of our national Association, Mr. James D. Hailman of Pittsburgh, Pa. It has been some time since the New England Division has had the honor of entertaining the national president at one of its own meetings, and a large attendance will surely be forthcoming. After the business meeting at 1.00 o'clock on Saturday, an enjoyable social program is promised. Come and bring the usual New England enthusiasm and show our president that we are with him and appreciate his presence at our meeting. Please advise at the earliest date possible that you will be with us, and receive any further details. This is the only notice of the meeting that will be issued. Address Miss E. J. Meriam, Assistant Sec'y, N. E. E. A., 50 Congress St., Boston, Mass.

NECROLOGY

Miss P. E. Curtis, New York City.
 Mr. John Quindry, Fort Branch, Ind.
 Prof. J. E. Gow, Cedar Rapids, Iowa.

THE STUDENTS ESPERANTO LEAGUE

Clyde Kennedy, Sec'y, Parsons, W. Va.

The library of the Students Esperanto League, the nucleus of which was given by Mr. Wyatt Rushton, has been increased by gifts from Messrs. J. D. Hailman, G. P. Ferree, Herbert Harris, and Harold Kline, and now contains the following books: Advokato Patelin, Angla Lingvo sen Profesoro, Anjo, Ave Patria, Batalo de l' Vivo, Benkoj de la Promenejo, Bona Sinjorino, Christmas Carol, Cindrulino de Aleksandrio, Deveno kaj Historio de Esperanto, Diversaĵoj, Elektitaj Fabloj de La Fontaine, En Fumejo de l' Opio, En Malliberejo, Evangelio de Sankta Mateo, La Ĉiutaga Vivo, La Faraono, Hamleto, Humorajoj, Hungaraj Rakontoj, Indo-Eŭropaj Lingvoj, Interrompita Kanto, Julio Cezaro, Kaatje, Kantaro Esperantista, Kanto de Triumfanta Amo, Kiel Plaĉas al Vi, Kolekto de Hungara Esperantisto, Kolomba Premio, Krestomatio Fundamenta, Krestomatio Internacia, Marta, Mia Liro, Mopso de Lia Onklo, Norman Con-

quest, Nova Testamento, Noveletoj el la Nigra Arbaro, Princo Vanc', Protesilas kaj Laodamia, Puto kaj la Pendolo, Rakontoj pri Feinoj, Reĝo de la Ora Rivero, Rolandkanto, Sep Ridoj, Serĉado por la Ora Saflano, Si ne legos Ĝin, Solo de Fluto, Sub la Meznokta Suno, Tatterley, Turisto kun la Verda Stelo, Unua Legolibro, Unu Fojon, Verdaj Fajreroj, Virineto de Maro, Vort-Teorio en Esperanto.

Selanoj, are you making good use of this free lending library at your entire disposal through the generosity of several members of E. A. N. A. and S. E. L.? Write Frank Manning, President of S. E. L., 56 Atlantic st., Portland, Me., for full information concerning the books. Don't forget to enclose a stamp for your reply!

In the spring one's thoughts turn toward — examinations. No doubt this is a convenient time for you to qualify for the diplomas granted by the national Association. Special terms to members of E. A. N. A. Write for information to the Chairman of the Examinations Committee, Mr. Herbert Harris, 10 Henry st., Portland, Me.

Are you using the E. A. N. A. Peace Stamps on all your correspondence and

Have you secured your E. A. N. A. button yet?

END OF OFFICIAL PART

Tia Bonedukita Knabo

Estis sur tramo kaj okazis antaŭ unu aŭ du tagoj. Knabo, eble dek kvar jara, subite leviĝis kaj donis sian sidejon al dika sinjorino. La sinjorino rigardis lin kaj diris:

“Vi estas ĝentila knabo. Malmultaj knaboj nuntempe faras tion.”

“Mi opinias ke vi ne legis la hieraŭan ĵurnalon,” diris la knabo. “Estas rakonto pri knabo kiu donis sian sidejon al sinjorino kaj kiam ŝi mortis, la lastan semajnon, ŝi testamentis sep mil dolarojn al li.”

“Mi ne vidis tion,” diris la sinjorino.

“Eble vi vidis tiun pri la knabo kiu portis korbon por maljunulino, kaj ŝi donis al li brikan domon kaj movbild-teatron.”

“Ne,” diris la sinjorino. “Mi ne vidis tion.”

“Estas alia,” daŭris la knabo, “pri knabo kiu fordonis malsupran dormobenkon en dormvagono al virino kaj ŝi testamentis al li sian tutan riĉaĵon. Mi ne scias kiom ĝi estis, sed ĝi kredeble estis granda. Vi vidas kiel estas — oni devas ne riski hazardojn.”

La sinjorino solene balancis la kapon. “Benu la homon kiu elpensis tiujn rakontojn,” ŝi solene diris.

Cleveland Plain Dealer—W. H. H.

DEK-UNUA UNIVERSALA KONGRESO

Aŭgusto 22an-29an, 1915

San Francisco, Calif.

Notoj pri la Esperantaj Kongresoj

Unue, estas urĝate de la loka komitato prizorganta la antaŭajn aranĝojn por la kongresoj ke tiel multe da esperantistoj kiel eble faru planojn por la ĉeestado. Estas certigate al ĉiuj ke ili trovos la tutan aferon interesplena, bone valoranta la uzadon de la tempo kaj la elspezon de la monkkosto. Pliboniĝo, edukado, plezurego,—ĉu tiuj ĉi ne altiros vin?

Due, ke vi tuj varbu kiel kongresano, pagante al la kasisto, kies adreson kaj prezon de membrokarto vi povas trovi aliloke en tiu ĉi gazeto, la ĝustan sumon. Memoru ke la baldaŭa enkasigo de la kotizajo estas grava helpilo al la sukceso de la kongresoj. Ne prokrastu. Monhelpo estas eble la devo de ĉiuj esperantistoj kiuj deziras antaŭenpuŝi la propagandadon de nia inda movado.

Trie, eĉ se vi sciis ke vi ne povos ĉeesti la kongresojn, estus merita ago ke vi kiel aŭ esperantisto aŭ bonvolulo helpu laŭ via ebleco, aĉetante almenaŭ "helpkongreskarton."

Tiun ĉi faru kaj la kongresoj estos indaj je nia lando kie dum antaŭaj jaroj ni ne marŝis tiel forte kiel la fratoj en Eŭropaj landoj, kaj la movado inter ni eble mankis la fervoran laboron, la grandajn rezultatojn kiuj estis montrataj trans la Atlantiko.

La loka komitato estas preparanta seriojn de bildpoŝtkartoj kun Esperanta teksto. Je la dato kiam estos presata tiu ĉi noto ili estos pretaj por dissendado.

Se vi dubas pri la grandeco kaj belegeco de la Panama-Pacifika Ekspozicio kiun vi povos viziti kiam vi venos al la kongresoj, petu poŝtkarte de "Esperanto-Kongreso, Saan Francisco, Calif." la Fakt-Libron. La broŝuro enhavas, esperante presita, multajn informojn kiuj vin interesos.

S-ro D. E. Parrish, sekretario de la 11a Universala Kongreso faris bone kiam li proponis "Komitaton Tut-Usonan." Bonkore jam respondis kaj akceptis la inviton tiel famuloj kiel Fessenden, Simonek, Schuyler, Harris, Hailman, Scott kaj Fazel, kaj pluaĵ nomoj estas aldonataj. La laboro de la komitato estas precipe konsila, krom la varbado de novaj kongresanoj kaj ĝenerala propagando por la kongreso.

Pacon la mondo plej ŝatas kiam venas milito. Nur tiam kiam la teruro estas inter ni, estas realigeblaj la detruado kaj suferado.

Esperantistoj estas pacemaj. Ili ne estas malamikoj unu kontraŭ la alia, escepte ke ili estas perforte tiel devigataj pro cirkonstancoj kiujn ili ne povas kontroli.

Cu estas tro multe da espero ke la mondkongreso de esperantistoj povos fari ion por la repaciĝo de la batalantaj homoj? Internacian lingvon ni urĝas por ke estu interkompreniĝo inter la diversaj nacioj kaj rasoj de la mondo. Cu la Universala Kongreso de Esperanto ne povos proponi planon per rekomendo aŭ rezolucio kiu eble atingos la regnestrojn de la batalantaj landoj kaj tiamaniere supersarĝi la pesilon je la flanko de paco? Eĉ se la kongreso ne povos efiki ion en la nuna milito, supozante ke ĝi daŭrigus dum la venonta somero, ni montru ke mondlingvuloj deziregas mondpacon por ĉiam.

D-ro Zamenhof antaŭ ne longe skribis pri tiu jene: "Sinjoroj, Diplomatoj: Eŭropo atendas ne kelktempan interpaciĝon, sed pacon konstantan, kiu sole konvenas al civilizita homa raso. Sed memoru ke la sola rimedo por atingi tian pacon estas forigi la regadon de unuj gentoj super aliaj gentoj."




Dedication Ceremonies, Avenue of Palms

La loka komitato estas preparanta esperantan Gvidlibron pri San Francisco, la ĉirkaŭaĵo kaj la Ekspozicio por la uzado de la vizitontaj kongresanoj kaj ankaŭ tiuj kiuj posedos kongreskarton. Ili intencas eldoni minimume 1500 ekzemplerojn. Kelkaj paĝoj estas disponeblaj

por reklamoj je kiuj la atento de interesuloj estas direktata. Ciu paĝo kostas po \$5.00 kaj la teksto devas atingi la komitaton antaŭ la mezo de Julio. Adresu Esperanto-Kongreso, San Francisco.

Specialan atenton donis la komitato en la preparado de taŭga kongresinsigno. La formo de la pendaĵo estas belega; ĝi estas kaj signo kaj ornamaĵo. Vi surportos ĝin fiere kaj posedos ĝin kiel trezoron. Ĝi estas ankaŭ multekosta sed disponebla al la kongresanoj kaj la help-kongreskart-aĉetontoj.

Frue prizorgu ke vi estu la feliĉa posedanto!



Esperantistoj en tiu ĉi lando multe respektas kaj alte valoras E.A.N.A.; ĉiuj havas fierecon en ties historio kaj nuna stato. Tiu organizado, bone estrata kaj gvidata, entenanta fervoran anaron, forte kaj konstante subtenas la movadon en Usono. Ni atendas grandan ĉeestadon de E.A.N.A. anoj je ilia kongreso, kaj oni povas facile certigi ke la kunsidoj estos kaj interesplenaj kaj utilaj. La progreso de la propagando multe dependas je la forteco de agema centra organizado. Ni ĉiuj subtenas. Antaŭen kun la standardo!

Je la sama semajno kun la esperantaj kongresoj okazos en Oaklando la kunvenado de la "National Educational Association." Tiu ofte altiras 50,000 instruistojn el ĉiuj ŝtatoj en Usono. La ĉefkomitato esperas aranĝi ke Esperanto estu prezentota al ili per parolado aŭ alimaniere. Se vi kapablas, proponu sugestion por la celo ke ni im-

presu nian aferon je ili. La lingvo Esperanto prave apartenas al la lernejoj. Ni atingos nian celon nur kiam ĝi estos tien enkondukata kaj akceptata kiel rajtigata studado.

“Komitatano”
(F. E. Cornish)

MALKOMPENIĜO

De Aleksandro Dumas

Kvankam mi tre deziris atingi la lagon de Konstanco kiel eble plej frue mi estis devigita fari halton en malgranda vilaĝo kelkan distancon de ĝi. Pluvegis jam de kelke da horoj kaj la ĉevalo kaj veturigisto rifuzis iri eĉ unu paŝon pluen.

Car la koto estis profunda ĝis la akso kaj la veturigisto malsekega ĝis la haŭto, ilia volo halti ne estis senrajta. Kontraŭbatali ĝin estus kruele al la homo kaj ankaŭ al la besto.

Nenio krom tiel humana motivo povus decidigi min meti piedon en la mizeran gastejon, kies nomtabulo haltigis min. Apenaŭ mi eniris la mallargan koridoron kondukantan al la kuirejo, kiu servis ankaŭ kiel komuna ĉambro de vojaĝantoj, atakis miajn naztruojn la odoro de acidigita brasiko, anoncante, kiel menuo ĉe la pordo de restoracio, la kvaliton de mia manĝo.

Nu, pri la acidigita brasiko mi povas diri, kiel certa abato diradis pri la gadaĵo — ke se la mondo enhavus nur acidigitan brasikon kaj min, baldaŭ estus la finiĝo de la mondo.

Apenaŭ mi sidiĝis al la tablo, ĉe kies fino faris al mi lokon du ĵus alvenintaj ŝarĝveturilistoj, kiam oni metis antaŭ min profundan teleron plena je la dirita manĝaĵo.

Feliĉe mi antaŭvidis tion. Mi ŝovis flanken la pladon, kiu fumiĝis kiel la monto Vezuvio, kun nea ekdiro tiel forta, ke oni ne povis falskompreni mian seriozecon.

Germano neniam povas kredi al siaj oreloj kiam oni diras al li, ke iu persono ne ŝatas la acidigitan brasikon; kaj, se oni esprimas la malŝaton en lia nacia lingvo, lia miro ŝveliĝas montalten.

Sekvis spaco da silento dum la mastrino penadis malkonfuziĝi. Fine ŝiaj pensoj elbuŝiĝis per frazo dirata en vortoj tiel sensekvaj, ke ili estis tute nekompreneblaj; tamen per sia vizaĝa esprimo ŝi diris tiel klare, kiel per la vortoj:

“Nu do, sinjoro, se vi ne ŝatas la acidigitan brasikon, kion nome vi ja ŝatas?”

Naŭzo provizis al mi memoron, lingvaĵon kaj elparolon, kaj mi diris en la plej fortika germana:

“Kion ajn en la mondo krom tio.”

Kun submetiĝa mieno la mastrino forportis la malŝatatan acidigitan brasikon. Mi pacience atendis la duan pladon, sed vane.

“Nu,” mi diris fine.

“Nu,” respondis la mastrino.

“Mian manĝon.”

“Ho, certe,” kaj ŝi realportis la acidigitan brasikon.

Nun estis tute certe, ke se mi ne faros ion por savi min, la bona virino persekutos min ĝis la mondfina juĝado.

Feliĉe, granda hundo de la raso Sankta Bernardo sidis, tordante la piedegojn kaj nazegon antaŭ fajro sufiĉe varmega por rosti bovon. Mi vokis la beston. Ĉe la unua ekmonro de mia bonkora intenco, ĝi forlasis la kamenon, venis al mia flanko, kaj per tri englutoj ellekis la manĝaĵon, la kaŭzon de mia ĝeno.

“Bone, belulo,” mi diris, kareseme batetante ĝian kapon; kaj mi redonis al la mastrino la malplenan teleron.

“Kaj vi,” ŝi demandis.

“Mi volas ion alian.”

“Sed estas nenio alia en la domo.”

“Kiel!” mi ekkriis pro la profundeco de mia malsato, “Nenio alia! Ĉu vi ne havas ovojn?”

“Ne.”

“Ĉu kotletojn?”

“Ne.”

“Terpomojn?”

Ĉiam la saman respondon: “Ne.”

“Ĉu vi havas.....kelke da.....kelke da.....” Nun feliĉa ideo trafulis mian cerbon. Mi rememoris, ke oni forte konsilis al mi ne travojaĝi ĉi tiun regionon sen gustumo de ĝiaj fungoj, pri kiuj oni diris, ke ili estas bongustegaj kaj estas fame konataj en ĉirkaŭo de kvindek mejloj. Sed, kiam mi ekdeziris profiti la ĝustatempan rememoron, unu embaraso sin prezentis — mi ne povis rememori la germanan nomon de la bongusta vegetaĵo.

Sed mia forta malsato urĝis min; kaj kun malfermita buŝo mi ĉiam ankoraŭ ripetadis la nedifinitan numeralon: “kelke.....kelke.....” El ĉiuj manĝaĵaj nomoj, kiu estas la germana nomo de fungo? “Kelke.....kelke.....kelke.....”

Kun la okuloj fiksitaj sur miaj lipoj, la mastrino avida atendis la tre deziritan nomon.

“Kelke.....kelke.....” Ĝuste tiam mia rigardo okaze falis sur mian skizlibron.

“Iom atendu,” mi diris; “ideo venis al mi.”

Mi eltiris krajonon, kaj, sur pura blanka folio, mi desegnis, tiel

ĝuste, kiel mi nur povis, la altvaloran funĝon, kiu estis la ĉefa objekto de mia tiama deziro.

Tiel plene mi estis inspirita, ke mi povas diri sen fanfaron, ke mi sukcesis tiel laŭnature prezenti la vegetaĵon, kiel nur povas fari la mano de homo.

La gasteja mastrino ĉiam rigardis mian faradon kun inteligenta scivolo, kiu promesis la plej kontentigan rezultaton.

“Ho, jes, jes, jes,” ŝi ekkriis kun radianta vizaĝo, tuj kiam mi faris la finan streketon en la desegno; kaj ŝi rapidis el la ĉambro.

Fine ŝi komprenis — admirinda virino!

Ŝi tiel bone komprenis, ke post kvin minutoj, ŝi revenis kun triumfo pentrita sur la vizaĝo, alportante malfermitan ombrelon!

“Jen ĝi estas,” ŝi diris.

Mi ekrigardis mian malfeliĉan desegnon — la simileco estis perfekta.

El la angla lingvo tradukis Gego,
Tradukinto de “Alegorioj el la Naturo.”

PRI LEGADO EN MOVIĜANTA VETURILO

Multaj kredas, ke malutilas la okulojn, legi en vagono, sed ŝajnas, ke nur kelkaj scias kial. La kaŭzo estas trostreĉado de la delikataj okulmuskoloj. La movado de l'vagonaro skuadas gazeton aŭ libron, konstante ŝanĝante ĉi ties pozicion kaj distancon de la okuloj, devigante do, ke la okuloj senripoze alĝustigadu la fokuson. Ekstraj klopodoj tiel falas sur tiujn muskoletojn, ĉar ŝanĝiĝo de fokuso okazas iafoje cent fojojn en unu minuto.

Alia kaŭzo de okulstreĉo dum legado en vagonoj estas nebona lumigado, kion oni ordinare renkontas. Oni ofte provas legi vesperĵurnalon en vagono aŭ tramo, ĉe l' krepusko, antaŭ kiam la veturil-lampoj estas lumigitaj. Cetere, eĉ kun lampoj brilantaj la situacio ne tre pliboniĝas. La vagonoj estas ofte superplenaj kaj starantaj pasaĝeroj balanciĝadas inter la ĵurnalo kaj la lumilo. Kutime la lumilo pendas alte ĉirkaŭ la centro de la ĉarplafono kaj estas malbone lokita por legado, tial ke la lumo estas tro malproksima de la presajo kaj la radioj rebrilas en la okulojn for de la libro aŭ revuo.

Kelkaj usonaj vagonaroj nun havas bibliotek-vagonojn, kun la lumfonto malantaŭ kaj flanke de la leganto. La plej novaj kaj bonaj litvagonoj “Pullman” prezentas flanklampetojn por legado.

Herbert M. Scott.



NOVAJ LIBROJ

A PRACTICAL GRAMMAR of the INTERNATIONAL LANGUAGE, by Ivy Kellerman Reed, Ph. D., Price 50 cents. English-speaking Esperantists are fortunate in securing this entirely new and original text-book among an ever-increasing library of more or less excellent grammars for the study of Esperanto. The author of "A Practical Grammar" has apparently compiled the book with two objects in mind, First, to place before the student, in twenty concise lessons, a practical and correct treatment of the grammatical rules, supplemented by illustrative examples and exercises, and second, to put into the hands of the acknowledged non-linguist an instrument by which to acquire the international language, that upon trying out will fill him with no sense of discouragement over mastering fractious rules, elusive tenses and difficult participles.

It is probably safe to state that a majority of the rank-and-file Esperantists, grasping the idea of Esperantism and wishing to further it by a correct working knowledge of the language, have either forgotten most of the rules of English grammar learned in school, or else have never had the opportunity to secure a thorough knowledge of those rules. This book is acknowledgedly "sugar-coated" for this particular class of Esperantists. Upon looking at a lesson as an example, we find the rule governing the subject-matter of the lesson presented in a brief and clear manner, followed by sentences in Esperanto with the English equivalents to bring out the points being illustrated. Next, a short vocabulary, a reading exercise containing from twenty to twenty-five sentences in Esperanto, and then a dialogue in Esperanto,—a sorely needed and most commendable addition to an Esperanto text-book,—are followed by a group of sentences in English for translation work.

In the appendix the international money system is explained and examples given of the international system of weights and measures. A selection from the speech of Dr. Zamenhof at the 1910 Congress in Washington, D. C., common abbreviations, names of the days of the week and of the months, and the words of the Esperantists' "national anthem," are followed by a resume of the words used in the vocabula-

ries throughout the book, in both English-Esperanto and Esperanto-English.

The reviewer feels the space inadequate to give a comprehensive idea of the manner in which the author, profiting by personal experience and the deficiencies found in the cheaper grade of Esperanto text-books, has welded into shape a grammar which truly supplies a long-felt need. Teachers of Esperanto classes and isolated students have much regretted the dearth of a suitable 50-cent text-book and the appearance of "A Practical Grammar of the International Language" supplemented by that authoritative reference and high-school text-book, "A Complete Grammar of Esperanto" gives a distinct advantage and inducement to a thorough and correct knowledge of this subject which we feel have never before been extended.

LA VENECIA KOMERCISTO, 101 paĝoj, 50 cendoj.

Kiu provas traduki la verkojn de Shakespeare, tiu estas kuraĝulo. Kiu bone tradukis ilin estas artisto.

S-ro Wackrill riĉigas nian literaturon per lia lerta kaj plaĉa traduko de unu el la plej ĉarmaj kaj bone konataj dramoj de nia plej fama angla dramatiso.

Notinda estas la perfekta ritmo de la versoj kaj li preskaŭ tute evitas la uzojn de la apostrofo, tiu potenca ilo de la amatora poeto,— lambastono,—abomenaĵo!

Li mirinde konservas la petolecan vortludadon de Laŭncelot Gobo kaj la vivplanan spritecon de Portia, ankaŭ ŝian elokventan plendadon por Antonio.

Kiom da beleco aŭ potenco de la Angla estas perdita en ŝia parolado antaŭ la tribunalo?

"Kompato estas virto nedeviga;
 ĝi gutas pluve, dolĉe el ĉielo
 sur suban lokon. Per duobla beno
 ĝi benas: ĉe donado, ĉe ricevo.
 Ĝi plej potencas kun la potenculo;
 ĝi pli ol krono reĝon ornamadas.
 La reĝa sceptro mondan povon montras,
 simbolas respekteton, majestecon,
 sidejon de la timosent' al reĝoj;
 ĝi estas eco de la Plejpotenca;
 kaj monda povo plej similas Dian,
 se kompatemo spicas la justecon.

La tradukinto enkondukas novan vorton "neksta", kiu estas inda je zorga pripenso. Kiom multe el ni angloparolantaj Esperantistoj longtempe kaj vane serĉis vorton kiu donos la precizan ideon de nia "next"?

Berrien Springs, Mich, May 11, 1915.

Editor *Amerika Esperantisto*:

I note from your May issue that Mr. F. L. Buell, of Tillamook, Oregon, writes you concerning his isolation as an Esperantist, and giving some suggestions as to methods of isolated learning of Esperanto. I am also isolated. I do not know of an Esperantist within seventy-five miles of here, except as hereinafter mentioned. For a long time I also was obliged to converse with myself and the well known summer and winter winds, if I used Esperanto.

But I have a further suggestion for samideano Buell, and others similarly situated. Teach Esperanto to your wife! Then your chances for conversation are frequent indeed. My wife so far has reached a thorough knowledge of the first twenty-five lessons in Mrs. Reed's text book. It is surprising how much benefit I personally gain from this opportunity of using the language. It is also surprising how fluent Mrs. K— is becoming. She can even scold in Esperanto! So to each of the other hermits I suggest make an Esperantist of your wife. If you haven't a wife, get one.

Sincere la via,

Chas. H. K—.

“Now let us thank the Lord because the Esperanto language is created. * * * I repeat, the most important thing in the world is the realization of an auxiliary language. Oneness of language will transform mankind into one world, remove religious misunderstandings, and unite East and West in the spirit of brotherhood and love. Oneness of language will change this world from many families into one family. This auxiliary international language will gather the nations under one standard, as if the five continents of the world had become one, for then mutual interchange of thought will be possible for all.

* * *

—Abdul-Baha

La Ploranta Ĉerizo

Cerizo ploris. “Kial tia
Bruo? Kial ploras vi?”
“Car estas lipo de Julia
Pli ruĝa jen ol mi.”
Ne ploru, ĉerizet', kaj tio
Tute ne hontigu vin;
Ruben', koral', skarlat', — nenio
Superi povas ŝin.

Trad. Farnsworth Wright

The Esperanto Association of North America

The Esperanto Association of North America was organized July, 1908, as the union of individual Esperantists and local organizations, having as its purpose, in the words of its constitution, "the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, according to the Fundamento Zamenhofa, and, in particular, the formation of a close union between and among all individuals and organizations studying or using Esperanto."

Membership is not limited to those already knowing Esperanto, but is open to all who are interested in the movement, whether from a practical or altruistic point of view.

The General Council of twelve members, each elected by the votes, in person and proxy, of the members in his own division, constitutes the legislature and elects the officers and committees. Each councilor is elected annually, and may be recalled at any time by majority vote.

In several sections there are district federations, Chartered branches of the Esperanto Association of North America, which act for the general association in their given territories. Membership in such district federations includes membership in the general association, and vice versa, without payment of any additional fee.

The work of the Association and all its officers is entirely of a "missionary" character. Whether or not an inquirer is likely to become a member, the Central Office of the As-

sociation will freely supply information to all who desire to investigate Esperanto, will recommend suitable text books, competent local teachers or correspondence courses, and will supply material for newspaper articles, furnish names of others in that locality who are interested, and give any other possible assistance to persons desiring to organize a local class or society, or will give the names and addresses of the nearest already existing society or district organization. Examinations are conducted by the Association Examiners, and diplomas granted to those qualified. (See leaflet "Examinations," sent upon receipt of stamp).

The "missionary work" of the Esperanto Association of North America is wholly supported by the membership fees and contributions of those interested.

The fee for active membership is fifty cents for each fiscal year (or part thereof), which ends September 30th, and everyone interested in the progress of the Esperanto movement is earnestly requested to contribute to the Association's strength by adding his name to its rolls, and to contribute this fee to the work. One half of this membership fee is used by the Central Office for such propaganda expenses as postage, printing, etc., the other half is spent directly by the General Councilor, or, where one exists, by the district branch of the Esperanto Association of North America, in the division or State where the member resides.

APPLICATION FOR MEMBERSHIP

Fill out this application legibly and mail to Dr. C. H. Fessenden, General Secretary, The Esperanto Association of North America, Newton Centre, Mass.

I hereby apply for membership in **The Esperanto Association of North America**, and indicate by placing **X** in the column at the right the extent to which I will be able to cooperate in the work of said Association.

Name

Address

.....

Active Membership, 50 cents enclosed	
Special Membership, \$2.50 enclosed	
Sustaining Membership, \$10.00 enclosed	
I shall be glad to assist in the work of propaganda, and wish you to notify the nearest propaganda leader of the Association	

AMERIKA ESPERANTISTO

ORDER BLANK

The American Esperantist Co., Inc., West Newton, Mass.

Please send me at once, the items checked below, for which I enclose the sum of \$.....

Name

Address

..... Year's subscription to the monthly magazine, AMERIKA ESPERANTISTO, \$1.00	
COMPLETE GRAMMAR OF ESPERANTO (Kellerman), with vocabularies, \$1.25 postpaid	
Combination of one year's subscription to AMERIKA ESPERANTISTO with copy of COMPLETE GRAMMAR OF ESPERANTO, \$2.00	
STUDENTS COMPLETE TEXT BOOK (O'Connor), cloth, 50 cents	
PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO (Kellerman), 50 cents	

Send me also the following literature as shown in your book-list:

.....

.....

.....

.....

"WHEN THE WANDERLUST HAS SEIZED YOU"

The Song hit of Esperantujo!
(Schuyler-Miles)

POPULAR, CATCHY, TUNEFUL

A Propaganda Instrument as Entertaining as it is Valuable

35c

CORRESPONDENCE CARDS

An Esperanto correspondence postcard combining every-day usefulness with every-day propaganda. A 3½ x 5½ "Poŝtkarto" with

Esperanto Seal



in Corner

4 for 5c

25 for 25c

THE AMERICAN ESPERANTIST COMPANY, Inc.

West Newton, Mass.